# ESPERANTA FINNLANDO

1960

N:o 9

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj
Abonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto 8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj anoncoj): Männikkötie 5 M 67, MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## *Heroldo de Esperanto*

Mi akceptas abonojn por la gazeto »Heroldo de Esperanto», gazeto kun aspekto kaj formato de nacia taga gazeto kaj kun loko neŭtrale super la diversaj Esperantaj organizaĵoj. HdE aperas duonmonate, en somero monate. La abono en Suomio kostas 1000 mk.

La legantoj mem elektas la manieron de pagado. Ili povas pagi aŭ nun kun la mendo aŭ poste dum la riceva jaro, aŭ en unu fojo aŭ je partoj. Kiu volas pagi tuj, sendas la monon al mia poŝta ĝirokonto kaj indikas la mendon sur la kupono de la pagokarto. Kiu volas pagi poste aŭ je partoj, skribas al mi poŝtkarton kun indikoj pri la mendo kaj pri la dato(j), en kiu(j) li pagos. La pagado estu finita ĝis la lasta tago de venonta oktobro. Mia adreso estas »Pastro Hemmo TIETTI, LETKU», mia poŝta ĝirokonto havas la numeron 39.786.

Mi aranĝis la formon de la partopagado, por ke la legantoj havu la eblecon adopti po unu samideanon orienteŭropan aŭ azian. Subtena abono kostas 5-foje po 400 mk. Ekzistas pli da Esperantistoj en orientaj landoj ol ĉe ni, sed ili ne povas mem aboni al si eksterlandan gazeton. Por ĉiu el ili malgraŭ Esperanto la mondo estas ŝlosita; ni, nur ni, povas malŝlosi ĝin. Dek-riksa bileto estas la ŝlosilo, kiun ni havas kaj uzos por ili.

Hemmo Tietti

### ANDREO CSEH (Hago)
### 65-jara la 12 sept. 1960

La vicprezidanto de Akademio de Esperanto, sekretario de Universala Ligo, ĉefredaktoro de La Praktiko, honora membro de UEA, gvidinto de la unuaj oficialaj esp.kursoj por svedaj instruistoj kaj parlamentanoj, en tiu ĉi jaro festas sian 50-jaran jubileon de esperantisteco, 40-jaran jubileon de la genia instrumetodo Cseha kaj 30-jaran jubileon de Internacia Esperanto-Instituto. Lian apostolan agadon kronis- post la enkonduko de la internaciaj stelo-monbiletoj- la ĵusa ekcirkuligo de la zamenhofaj stelomoneroj.

Al la spirita patro de centmiloj da esperantistoj tutmondaj (inter kiuj ankaŭ la redaktoro de nia gazeto, kiu antaŭ 39 jaroj ricevis donace de Cseh la mirindan lingvon Zamenhofan) ni sendas niajn plej varmajn gratulojn kaj koregajn bondezirojn!

**Iom pri Zamenhofa Homaranismo.**

La ideo pri la fratigo de diversnaciaj homoj kaj popoloj regis la animon de Zamenhof jam pli frue ol la lingva demando. Li suferis pro la subpremata vivo de sia propra popolo, hebreoj, kaj penis fondi pacigan internacian movadon, kiun li komence nomis Hilelismo laŭ iama hebrea saĝulo Hillel. Pri la esenco de Hilelismo li diras, ke »ĝi estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon el lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siajn naciaj -religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco».

Tre frue li konvinkiĝis, ke Hilelismo bezonas komunan lingvon, kaj ĉiam tiuj du ideoj okupis lian tutan vivon. La fratigan ideon li tamen devis longe kaŝi antaŭ esperantistoj, kaj tial li subskiribis tiucelajn artikolojn per pseudonimo.

Komence lia interfratiga movado celis ĉefe plibonigon de la stato de hebreoj, sed baldaŭ li komprenis, ke la tuta homaro bezonas interfratiĝon, kaj li evoluigis siajn dogmojn pri la homaj rilatoj donante al la movado nomon Homaranismo. Esence la dogmoj de Homaranismo estas similaj kiel tiuj de Hilelismo. En sia parolado en la dua kongreso li klarigas, ke la deklaracio akceptita en la unua kongreso malpermesas nur, ke oni oficiale ligu iun ajn ideon al esperanto, sed ĝi ne povas malpermesi, ke oni private vidu en esperanto kaj esperantismo ankaŭ ideon. Kaj li eldiras interalie tiujn ofte ripetitajn vortojn: »Se nin, la unuajn batalantojn por esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por esperanto, ni neiigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, kaj ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto. kaj ni ekkrios kun abomeno: Kun tia esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan».

## *Kion ni legu*

Zamenhof, Originala verkaro (1450,—)
Waringhien, Leteroj de Z, I kaj II (po 900,—)
Waringhien, Eseoj (720,—)
Waringhien, Lingvo kaj vivo (1100,— bind. 1400,—)
Neergaard, Vivo de Plantoj (800,—)
Lapenna, Retoriko (980,—, bind. 1200,—)
Lapenna, Internacia lingvo, Faktoj pri E. (575,—)
Lapenna, Aktualaj problemoj (500,—)
Esperanta Antologio (1440,—)
Boulton, Kontralte (720,—)
Bagh, Sonĝe sub pomarbo (720,—)
Szilágyi, Koko krias jam (720,—)
Szilágyi, Mistero minora (700,—)
Kivi, Sep fratoj (430),—)
Kaj multaj aliaj. Rigardu la libroliston en la jarlibro de UEA kaj kalkulu 1 guldeno = 100 mk.

Al ĉiuj prezoj aldonu la anfrankon!

La librojn liveras: Kirjoja toimittaa: Böckerna levereras av: ESPERANTO-LIBRARO, Töölöntullinkatu 7 A 2, Helsinki — Töölö. Postisiirtotili — Postgirokonto 6117.

**ĈIAM PORTU LA VERDAN STELON**

Belaj zehoslovakaj insignoj (stelo sur blanka rondo) po 100 mk.

ĈU VI MEMORIS reaboni nian gazeton? Abonu per poŝtĝira konto 8392.
zeton? Abonu per poŝtĝira konto 8392.
Enlande 350 mk, eksterlande 450 mk.

MUISTITTEKO UUDISTAA lehtenne tilauksen? Tilatkaa postisiirtotilin numerolla 8392, kotimaassa 350 mk, ulkomaille 450 mk.

ESPERANTO-INSTITUTO DE FINNLANDO, Männikkötie 5. M. 67. Helsinki.

Kokemäki 1960 — Satakunnan Maakunta Oy